



8-6-1974

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA - DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 - AP. 73 Caixa Postal 07 - 1182

Telefone 4-8033

11.100 - Santos (SP)

SECRETARIA

Telefone 42-9090

70.000 - Brasília (DF)

CGC Nº
00406 504/1000-06

BOLETIM Nº 37

AGOSTO DE 1978.

ÓRGÃO OFICIAL DO B.K.E.

Redação: — MARIA ALMADA

EĤOJ...

La gazeto "A Tribuna", el Santos (SP), en la 6-a de aŭgusto publikigis artikolon pri Esperanto, verkitan de al ni nekonata S-ro K.M., kiu pritraktas ĉefe la historion de la lingvo internacia ek de ĝia apero ĝis la nuna tempo. La verkinto de tiu artikolo substrekas la stagnon de la Esperanto-movado tra la mondo. Li elstarigas, ke nia movado ne sukcesis elmontri iun ajn kreskon en la lastaj dek jaroj. Se dum la pasintaj naŭ jaroj okazis "Nenio" en nia movado, vidu ni kio okazas en la nuna jaro, nome "en la deka jaro".

Antaŭ kelkaj tagoj finiĝis en Varna, Bulgario, la 63-a Universala Kongreso de Esperanto, kiun partoprenis pli ol 4.000 gesamideanoj el pli ol 40 landoj, kiel ĉiam okazas. En Varna estas menciinda la granda nombro da rusoj, hungaroj, poloj, orientgermanoj, romanoj, jugoslavo kaj eĉ ĉinoj el Pekino, ĉeĥoj, ktp. Tiuj elementoj ne havas eblon ĉeesti en Okcidento al Universala Kongreso pro la valutaj malfacilaĵoj, sed en Bulgario tio eblis, kaj ili amase partoprenis la kongreson.

En Francujo ankaŭ kongresis kun elstara sukceso la societo SAT — Sennacieca Asocio Tutmonda.

Ĉijare ekaperis forta intereso pri Esperanto en Irano kaj aliaj landoj de Azio.

En la Nova Kontinento, tamen elstarigis la I-a Latin-Amerika Kongreso, kiu realiĝis kun granda sukceso en la urbo Marilja, ŝtato San-Paŭlo, Brazilo.

Kun granda kontento ni devas reliefigi la senlakan laboron de nia vicprezidan-

to Prof-ro Wilson Ferreira Martins, el Marilja, kiu meritas la plej sincerajn laŭdojn pro la granda aktiveco eluzita de li, organizante, preskaŭ tutsola la kongreson.

Nenio mankis, li prizorgis akurate ĉion necesan por ke la evento fariĝu impona kaj plaĉa al la vizitantoj kaj al la samnacionoj pro tiom efika laboro, inda je la plej varmaj aplaŭdoj. Ni dankas lin kaj al ĉiuj kiuj lin helpis en tiu grava entrepreno, Gratulon!

En ĉilasta evento ĉeestis pli ol 600 geesperantistoj de pli ol 10 landoj: el Argentino (la plej multo), el Ĉilio, Urugvajo, Meksikio, Venezuelo, Usono, Francujo, Germanujo, Anglujo, kaj finfine el Brazilo mem. En Argentino la movado kreskas grandskale, kion atestas la nombro de la partoprenintoj en la I-a Latin-Amerika Kongreso. La moderna kaj komforta Marilja Tenisa Klubo estis plenplena okaze de la solena inaŭguro de la evento.

Multaj aŭtoritatuloj ĉeestis la malfermon de la kongreso. Inter ili troviĝis la s-ro urbesto de Marilja, Theobaldo de Oliveira Lyrio kaj la prezidanto de la Komununa Ĉambro, D-ro Sebastião Monaco; s-ro Mieczisław Klimas, Konsulo de Polando, s-ro Homero Sena, Representanto de la Ĝenerala Sekretario de la Ministerio pri Edukado kaj Kulturo, s-ro José Theodoros dos Santos, reprezentanto de la Ministerio pri Komunikado, D-ro Carlos Antonio Monteiro, reprezentanto de la Sekretario pri Sporto kaj Turismo de Ŝtato San-Paŭlo, D-ro Nid Dutra de Amorim, reprezentanto de la Guberniestro de Brazilio (FD), la deputitoj

D-ro Diogo Nomura, Osiro Silveira kaj Oswaldo Doreto Campanari, kaj aliaj.

La urba muzikistaro ludis la nacian himnon kaj la "Esperon." Ĉiuj altrangaj personoj estis simpatie bonvenintaj, sed kiam s-ino Ursula Grattapaglia altabligis, ektondris aplaŭdoj dum longa tempo. Oni miris pri la populareco de la estraranino de la Universala Esperanto-Asocio, certe la plej alta universala organizaĵo pri Esperanto. Tiu fakto pruvis, ke ŝi estas ŝatata, ne nur en Brazilo, sed ankaŭ en tuta Latin-Ameriko, pro ŝia sindona laboro por Esperanto.

Tamen la plej grava estis la efika kunlaborado kaj persona ĉeesto de nia kara anaro, sen kies helpo la kongreso ne estus sukcesa kaj tiel grandioza.

La Ministerio por Edukado kaj ŝtataj instancoj, laŭ interveno de Brazilia Konsilantaro de Esperanto, subvenciis la kongreson per monhelpo.

La prelegoj estis altnivelaj. Elstarigis la scienca, farita de la inĝeniero Alberto Barrocas, el Urugvajo, pri la graveco de la akvo kaj ĝia uzado en nia epoko.

"Ĉu ni pretrevivos la jaron 2000?" — Prelegis Prof-ro Curt Milkusch, el Buenos Aires. Pri la "Gerontologio": Kiel sane maljuniĝi, li ankaŭ prelegis. Pri "Cibernetika Pedagogio" prelegis Prof-ro Oswaldo Sangiorgi, de la Universitato de San-Paŭlo, reliefante ĝeneralizaĵojn kaj gravecon de Esperanto, helpata de F-ino Heliana Lucia Corrêa, kiu tradukis la prelegon. Pri la temo "Lu racia vortklasifiko en Morfologio" prelegis inĝeniero Felix Garcia Blazquez, el Caracas, Venezuelo. La plej aplaŭdita disertaĵo estis tiu de nia vicprezidanto, D-ro Paŭlo Sergio Viana, el Lorena (SP), pritraktante la "Antibiotikojn en la moderna medicino," kiu estis ne nur scienca sed ĉefe instrua, atentigante la homaron pri la trouzo de medikamentoj sen kuracista preskribo. Tiu prelego estis elstara kaj altvalora.

Pri "Turismo en Ĉilio" parolis Prof-ro Ivan Mattig, el Santiago, vekante la atenton de la aŭskultantaro, kiu interesiĝis pri turismaj informoj.

Ankaŭ estis grandvalora kaj interesa, vere utila, la prelego de nia vicprezidanto inĝeniero Alberto Flores, el Volta Redonda (RJ). Li pritraktis la laboron de la "Nacia Siderurgia Kompanio", utiligante lumbildojn, kiuj mirinde elmontris la aga-

don en tiu grava nacia entreprenon. Samtempe li disdonis libretojn klarigante ĉion rilate la entreprenon, verkitajn en Esperanto, kiuj estis aŭde postulataj de la kongresanoj. La kajoroj estis presitaj dank'al aŭdaca laboro de Sam-no Flores.

Samideano Pastro José Nogueira Machado, el Recife (PE), faris specialan prelegon pri "Homo Sapiens". Li elstarigis la "Homo Sapiens" antaŭ Kristo kaj la moderna epoko nia, kun granda sukceso.

Marilja urbo, kies loĝantaro nombras pli ol 130.000, akceptis kun simpatio la esperantistaron, kiu invadis kaj plenigis ĉiujn hotelojn, farinte turismon en tiu ĉarma urbo. La poŝtoficejo adoptis filatelan ŝtampilon, afrankitajn kovertojn, kaj funkciis ĉiutage en speciala ĉambro de la renkontejo.

Estis lanĉita la libro "Esperanto sen Antaŭjuĝoj" de nia vicprezidanto D-ro Walter Francini, eldonita de la Kultura Kooperativo de Esperantistoj.

Okazis kunsido de la Kongresa Komitato por la Universala Kongreso, antaŭvidata por Brazilio en la jaro 1981-a; ĝia prezidanto estos D-ro Nid Dutra de Amorim kaj la sekretario, Prof-ro Nelson Pereira de Souza, nuna ĝenerala sekretario de BKE.

En la kongresa programo elstarigis la muzikfestivalo de BEJO (Brazilia Esperantista Junulara Organizo). La juĝantaro estis internacia. La reprezentantoj de Argentino, Ĉilio, Francio, Urugvajo, krom brazilanoj, prijuĝis tri muzikojn, kiujn ni publikigos oportune. Estis tri la premioj: la 1-a Cr\$ 800,00; la 2-a Cr\$ 600,00 kaj la 3-a, Cr\$ 400,00. En la Internacia Vespere sin prezentis la F-inoj Elsa kaj Marta Solis (Argentino), kiuj bele kantis, ricevinte longedaŭrajn aplaŭdojn.

La vicprezidantino de BKE, Sam-ino Elvira Fontes, ankaŭ prezidantino de San-Paŭlo Esperanto-Asocio, kunvenigis la ILEI-anojn kaj varbis novajn membrojn por tiu grava monda organizaĵo, kiun ŝi reprezentas en San-Paŭlo kaj Brazilo.

Tre grava estis la deservo katolika, celebrata de la pastro Nogueira Machado, helpata de la pastro Roque dos Santos.

Menciinda estas la fakto, ke la naciaj informiloj (gazetoj, radioj, televido, ktp.) informis vaste kaj amplekse tra la tuta lando, eĉ eksterlanden, pri la Latinamerika Kongreso de Esperanto. En Santos(SP)

la gazeto "A Tribuna", intervjuis la prezidanton de BKE, Prof-ro F.S. Almada, kiu donis informojn, ne nur pri la Internacia Lingvo, sed ankaŭ pri la Kongreso, kio ebligis multajn interesatojn informiĝi pri Esperanto.

Sendube tiu kongreso estas la "heroldo" de la pli grava evento, la unua Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 1981-a, prizorgata por Brazilio.

La Postkongreso en Bauru (SP) — Bauru situas ĉirkaŭ 100 kilometroj de Marilja, kien la kongresanoj veturis per aŭtobusoj por fermi solene la Latinamerikan Kongreson de Esperantistoj.

En la sidejo de la Filozofia Fakultato "Federação das Faculdades do Sagrado Coração", salutis la kongresanaron la urbestro de Bauru, D-ro Oswaldo Sbeghen kaj la prezidantino de la fakultato, monaĥino Vilma Rubia de Lima. Ĉeestis ankaŭ la prezidanto de la urba konsilantaro, D-ro Innocencio Medina Garcia kaj aliaj aŭtoritatoj, inkluzive profesoroj de la fakultato.

La prezidanto de la Esperanto-Societo de Bauru, s-ano Euclides Geraldís de Carvalho, vicprezidanto de nia B.K.E., ankaŭ senlace ĉion faris por ke la postkongreso estus bele aranĝita, allogante la esperantistaron, kiu visitis la urbon Bauru. Fakte ĉio aspektis agrable kaj bone organizita. Ni lin gratulas.

Profesorino Lea Zanotti Soares kantis en Esperanto, akompanata de la Prof-ino Hilda Campos, ludante pianon. La monaĥinoj disdonadis belegajn bildkartojn pri la fakultato kaj pri la urbo mem. Finiĝis la renkontiĝo pere de kantado de la "Espero" kaj kun bongusta lunĉo.

Certe la vizitantoj ne forgesos la ĝentilecon de la baŭruanoj, kiuj estis tre afablaj kaj gastamaj. Ni ankaŭ dankas tiun laŭdeblan agmanieron.

REZOLUCIO I — La I-a Latinamerika Esperanto-Kongreso, okazinta en la urbo Marilja (SP), Brazilo, je ĉeesto de ĉirkaŭ 600 personoj el 11 landoj.

Konstatante:

- 1 — ke unuafoje oni sukcesis kunveniĝi en nia kontinento esperantistojn el diversaj Amerikaj landoj kun observantoj el Eŭropo;
- 2 — ke tio estas tre utila al la progresanta movado en la Nova Mondo;

3 — ke la latinamerikanoj jam forlasis sian izolitecon kaj komencis vere novan periodon de kunlaboro en la regiono;

4 — ke pli intima kunagado en la regiono estas ja treege dezirinda por atingi la celojn de la internacia lingvo;

5 — ke tiuj esperantistoj montras intereson pli aktive partopreni la tutmondan movadon;

6 — ke estas kreskanta nombro da sciencistoj kaj teknikistoj esperantistoj en la Amerikaj landoj;

Rekomendas:

I — ke la landaj asocioj en Latinameriko invitu, kiel eble plej ofte, latinamerikajn kongresojn en sian landon por regula interŝanĝo de ideoj kaj diskutado de problemoj;

II — ke en la landoj, kie ankoraŭ ne estas organizita movado, oni laboru por atingi tion;

III — ke estas nepre necese al ĉiuj landaj asocioj aliĝi al UEA Universala Esperanto-Asocio kaj aktive partopreni en ĉiuj kampoj de la internacia movado;

IV — ke la provizora komitato nun starigita prezentu en la venonta Latin-Amerika Kongreso difinitan proponon por la fondo de Tut-Amerika Asocio de Sciencistoj kaj Teknikistoj Esperantistoj.

Marilja, la 22-an de Julio, 1978.

☆☆☆☆☆

MONO RICEVITA POR LA BULTENO

El tuta koro ni dankas la monhelpon donacitan de la jenaj esperantistoj:

D-ro Wilson Deslandes	Cr\$ 500,00
Prof-ro Delio Pereira de Souza . .	500,00
D-ro Braz Cosenza	100,00
D-ro Helio F. Aderne	100,00
Chesoneso Galvão	100,00
D-ro Cesar Leal	50,00
Alberto Curuopos	100,00
Arlinda Gonzales	100,00
Onias de Almeida	100,00
Fanny L. Dupré	200,00
Sirio Silva	100,00
Mozart Alves de Andrade	50,00
Estela Santos	50,00
Maria da Encarnação Moreno . .	100,00
Wilson Ferreira Martins	5.000,00
Balbina Ferreira	200,00
Maria Almada (esperantaĵoj) . . .	936,00
Tuto	8.286,00

GAZETOJ RICEVITAJ — Revuo "Pesca", de Ilhéus (BA); "Reformador", "Comarca", de Promissão; "Semanário", de Ilhéus; "A Tribuna", de Santos; "O Expedicionário" de Rio de Janeiro; "O Líder", de Barra Mansa; "Diário de Marília"; "Meninão Santista", de Santos; "Leão de Grajaú" (RJ); "O NO-SSO"; "Correio Fraterno" do A.B.C. (SP); "A Voz da Cidade", de Barra Mansa (RJ); "Jornal Oficial de Ilhéus"; Bulteno de SEK-Sorocabá (SP); "Matutino Popular", de Caçapava (SP); "O Caminho", de Taubaté (SP); "O Espírito Fluminense" (RJ); "A Folha de Jaguarão" (RS); "Correio de Marília" (SP);

Ĉiuj gazetoj publikigas artikolojn de niaj laboremaj gesamideanoj.

Dankegon!

☆☆☆☆☆

NI SCIIGAS ...

Ilheus (BA) — Nia Vicprezidanto Eleus M. de Sá sendis al ni la "Jornal Oficial", el Ilheus (BA), kiu aperigas la Leĝon N^o 1.188, pere de kiu la urbestro rekonis Esperanton kiel lingvon de publika utileco. Ni gratulas Samideanon Eleus pro tiu nova venko.

Daŭrigu tiel, kara kunlaboranto!

☆☆☆☆☆

Caçapava (SP) — La gazeto "Matutino Popular" el tiu progresema urbo publikigas fotografiaĵon pri soldatoj en la Revolucio de 1932. Inter la herooj estas nia Samideano Majoro Gilberto A. Silva Velho. Ni eltrovis tiun alian kvaliton de nia vicprezidanto; nome, li estas militisto preta defendi nian patrujon.

Kiel esperantisto fervora, li ne neglektas, li vojaĝas, vizitadas gesamideanojn kaj estas vere unu el niaj plej aktivaj membroj. Okaze de la ĵus pasinta kongreso, li starigis en la kongresejo esperantan ekspozicion, kiu al ĉiuj plaĉis.

Ni gratulas al nia Samideano Silva Velho.

☆☆☆☆☆

Rio Claro (SP) — La hejmo de niaj gesamideanoj Moraes, el Rio Claro, riĉiĝis kun la naskiĝo de bela filineto, al kiu ni deziras longan vivon.

San-Paŭlo (SP) — Ni kondolencas.

Kun bedaŭro ni sciigas, ke nia kara sam-ino Ilse Jalovska, el San-Paŭlo, forpasis en la 25-a de junio, 1978. Ŝi multe helpis la movadon finance, okaze de la aĉeto de la sidejo de San-Paŭlo Esperanto-Asocio. Ŝi gvidis kursojn en la sama sidejo. Ni kondolencas ŝiajn parencojn bedaŭrante ŝian foreston, kiu malĝojigis la geamikojn en la Asocio.

☆☆☆☆☆

Casa Nova (BA) — Ankaŭ forpasis nia kara samideano Hermes Pitta, el Casa Nova (BA), en la 8-a de Majo, 1978. Li estis profesoro de multaj eminentaj esperantistoj en ŝtato Bahia.

Senlaca batalanto por la Zamenhofa idealo dum longa tempo, li lasas al ni saŭdadon. Ke li ripozu pace.

☆☆☆☆☆

Salvador (BA)

Isao Noguti - La senlaca prezidanto de Bahia Esperanto-Asocio, gvidas Esperanto-kurson per korespondado. Li lernis la internacian lingvon en Salvador (BA), kie li loĝas lastatempe kaj tre efike aktivas. En spiritisma medio li aŭdis pri Esperanto kaj interesiĝis pri ĝia lernado. La idealo de Zamenhof allogis lin pro ĝia humaneca flanko kaj utileco. Dezirante komunikiĝi kun alilingvanoj li sin dediĉis al lernado de la lingvo kaj fariĝis fervora esperantisto, multe laborante por nia movado.

Tre estimata en sia organizo li kaptis la simpaton de la anaro de la asocio pro sia sindonemo kaj laborado efika. Estas li kiu ĉion planas, helpas mone, morale kaj senlace. Li ĉiam estas preta helpi la societon kaj pro tio estas tre ŝatata de ĉiuj asocioj.

Havante tiajn elementojn en nia movado ni estas certaj, ke ĝi progresos senhalte kaj kreskos seninterompe.

S-ino Vivaldina Caymmi - Apartenante al la sama organizo, Sam-ino Vivaldina

Caymmi, estas profesorino pri filozofio. Ŝi la unuan fojon aŭdis pri Esperanto ĉe la filozofia fakultato, kie ŝi laboris. Iuj el ŝiaj kolegoj parolis al ŝi pri la novbakita Esperanto-Grupo, kaj ŝi ekinteresiĝis pri la organizaĵo kaj pri la internacia lingvo. Kiel juna kaj aktiva profesorino, ŝi estis elektita de la grupo por zorgi pri ĝi. Do, vole-nevole, ŝi estis devigita lerni Esperanton.

En la unua tempo ŝi laboradis tutsola, sed poste ŝi starigis societon, kiu ĝis nun efike funkcias. Plurfoje Vivaldina estis elektita prezidantino de tiu societo kaj ankaŭ sekretario. Ŝi gvidis kursojn kaj organizas la movadon ĝis nun en la Asocio. Ankaŭ ŝi propagandas pri Esperanto kaj ĉeestas la seminariojn, kaj nun ĉeestis la 1-an Latinamerikan Longreson de Esperanto, per karavano.

Ŝi organizis junuran renkontiĝon en Salvador. La gejunuloj bele propagandis pri Esperanto portante bluzojn kun esperantaj distingiloj kaj sin nomis "gefiloj de Vivi"!

Vivaldina Caymmi neniam ĉesis labori por Esperanto, ŝi estas kunlaborantino de la prezidanto de la Asocio. Energia kaj rigora, ŝi tamen estas bonkora kaj bonhumora. La junularo ŝin konsideras simbolo de juneco.

Ŝi fieras, ĉar en Salvador nuntempe funkcias 14 esperantaj kursoj, inkluzive ĉe la fakultatoj. Tiu elstarigo de Esperanto estas ŝuldata al ŝia laboro, frukto de persista sinteno, helpata de ŝia grupo. Pro tiom da klopodo kaj sukceso Vivaldina estas ŝatata, kaj estimata de ĉiuj. Daurigu Vivi! Gratulon!

☆☆☆☆☆

San-Paŭlo (SP)

Ni korektas — Rilate la aĉeton de propra sidejo por la San-Paŭlo Esperanto-Asocio, ni ricevis informon, ke la direktanto de la kampanjo estis Adolfo Muniz Furtado al kies ekipo apartenis s-ano Nelson Silveira, ke ankaŭ la laboro de tiu ekipo estis bona.

Pri la afero informis nin, nia vicprezidanto D-ro Waldir Rocha kaj lia ĉarma edzino, s-ino Dalva. Ni dankas tiun sciigon al ambaŭ.

☆☆☆☆☆

ROMO (Italio) — Forpasis la 6-an de ĉi tiu monato la plej alta reprezentanto de la katolikismo, Lia Papa Moŝto Paŭlo la VI, protektanto de la malriĉuloj. Pacon al lia animo.

☆☆☆☆☆

Sorocaba (SP) — Sorokaba Esperanto-Klubo ĝentile donacis al la biblioteko de B.K.E. la libron "Flores Agrestes-Poeziaĵoj", de Benedicto Cleto, en nacia lingvo. Ni el tuta koro dankas la interresan donacon. La poemoj estas tre belaj, bedaŭrinde nur la portugalo-lingvanoj povas ilin ĝui.

☆☆☆☆☆

Rio de Janeiro (RJ) — La Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz sciigas nin, ke la adreso Rua São Braz, 460 ne plu validas, oni devas sin direkti al nova sidejo, akompanante la saman sidejon de "Caminho da Libertação", kiu ĝin gastigas. Tamen oni uzu la poŝkeston 3.133, CEP 20.000 — Rio de Janeiro (RJ), intertempe.

☆☆☆☆☆

BILANCETO PRI LA DUA TRIMESTRO 1978

Enspezo	Cr\$
Antaŭa Saldo	3.726,50
Kotizoj	2.039,65
Donacoj	20.000,00
Fonduso Ismael Gomes Braga	38.000,00
Librovendado	1.001,00
Sumo	64.767,15

Elspezo	Cr\$
Cirkuleroj	230,00
Poŝtmarkoj	1.173,40
Libroj eldonitaj	40.887,55
Novaj eldonaĵoj	20.000,00
Diversaĵoj	175,00
Saldo por venonta trim.	2.301,20
Sumo	64.767,15

Por la Estraro: Delio Pereira de Souza - Direktoro Administranto.

☆☆☆☆☆

Barra Mansa (RJ) — El ĉi tiu bela urbo ni havas nur agrablajn sciigojn: S-ino Denise

Deslandes sendis al ni la gazeton "A Voz", kiu publikigis grandan artikolon pri Esperanto kun la titolo "Paca Lingvo", de juna ĵurnalisto, Pedro Albeirice da Rocha, lernanto de BAMEC: Barra Mansa Esperanto-Klubo. Li kun granda entuziasmo klarigas al legantaro kio estas Esperanto.

Alia gazeto "O Lider", de la sama urbo, same informas pri nia movado dank'al niaj gesamideanoj Deslandes, kiuj senlace ĉion faras por progresigi la Esperanto-movadon tra la tuta lando. La familio Deslandes estas bonega ekzemplo por ĉiuj batalantoj. Ili vizitis Eŭropon utiligante la lingvon internacian, konstatante, ke estante esperantisto ne estas malfacile vojaĝi tra la mondo, kion ili persone havis okazon travivi. Esperanto ebligis al ili lasi eksterlande kelkajn geamikojn.

Estas menciinde, ke en Barra Mansa Prof-ro Amarilio Carvalho instruas la internacian lingvon en pluraj kursoj kun granda sukceso. Li estis la instruisto de la familio Deslandes. Ni gratulas la profesoron pro lia bonega laboro kaj al ge-sinjoroj Deslandes, kiuj tre inteligente komprenis la valoron de Esperanto, kunlaborante tre efike por la movado.

☆☆☆☆☆

Juiz de Fora (MG)

La 10-an de la nuna monato komenĉis la unua oficiala Esperanto-kurso en la Universitato de tiu progresema urbo. La kurson gvidos nia vicprezidanto Prof-ro José Passini. Ĝin partoprenos 30 gelnantoj. Prof-ro Passini utiligos la libron "Esperanto Elementar" de nia prezidanto, kiel instrumentodon por la komencantoj.

Kiel ni jam sciigis, Prof-ro Passini

defendis tezon pri Esperanto antaŭ ol komenci la oficialan instruadon, elmontrante grandan intereson pri tiu grava paŝo rilate la instruadon de la internacia lingvo. Lia tezo estis defendita ĉe la "PUC — Pontificia Universidade Católica do Rio de Janeiro". Ni deziras sukceson al kara Prof-ro.

La tezo estas aĉetebla ĉe nia redakcio, kiel helpo al nia BKE.

La "Revista Brasileira de Linguística" aperigas resumon, apud ĉiu artikolo, kune kun la angla lingvo, ankaŭ Esperante. La libron ĉefe uzas profesoroj pri filologio kaj lingvistiko. La uzado de Esperanto estis proponita de Prof-ro Jürgen Heye, kiu helpis la disertacion de Prof-ro Passini. Ni dankas al Prof-ro Heye la helpon.

Sam-no Kim(Sítio Tarumã,Poŝtkesto 162 — CEP 36.100 — Juiz de Fora (MG) donacis al ni Bultenon de la Tutmonda Esperantista Vegetara Asocio, kion ni dankas. Interesatoj turnu sin al li.

Indaiatuba (SP)

Nia vicprezidanto, Prof-ro Wanderley Peres, informas nin, ke la "Rádio Convenção de Itu" konsentis pri dissendado de Esperanto en programo de la 19,30 horoj ĝis la 19,40, ĉiusabate. Tiu propagando jam komenciĝis, kaj estas farata en la nacia lingvo. Ni gratulas nian kunlaboranton pro tiu laboro, esperante ke ĝi efikos kontentige.